

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 5

Novembro/Decembro 1979



23a Jarkunveno de GEFA en Heilbronn



foto: Ritterspach

Ŝvabaj bonvenigoj

Fervojistoj el 6 landoj en Heilbronn

Ĉe la norda rando de Ŝvabio, ĉu ŝvabia, ŝvaba aŭ ne, certe ŝvabeca, la industriurbo Heilbronn, 53 fervojajn kilometrojn norde de Stuttgart, gastigis la plej signifan germanan Esperanto-kunvenon de tiu ĉi aŭtuno. Inter la 5-a kaj 7-a de Oktobro 202 esperantistoj kongresis, laborkunsidis, ekskursis, sin klerigis kaj amuziĝis modele zorgumitaj de Siegfried Krüger kaj liaj kunlaborantoj.

La romantika

Kun la Sudafrika centro agrikultura kaj komerca Heilbron, evidente dokumentita nostalgio de elmigrintoj, nia kongresurbo nuntempe havas nenion komunan krom la samsona nomo. La nomdoninta Sankta Fonto el paganaj epokoj, ankoraŭ hodiaŭ sen saniga efiko, certe meritis tiun atributon, kiam la homoj naturepuran, sanevivan, bonan akvon akceptis kiel dian donacon. Pri „Nia respondeco por la natura medio“ temis ankaŭ la dimanĉa prediko de la ekumena diservo celebrata en Esperanto de la pastroj Burkhardt (KELI) kaj Degrelle (IKUE). Pastoro Adolf Burkhardt kun insisto kaj temperamento parolis pri la hodiaŭ arde aktualaj ekologiaj problemoj de la tero kaj la iom-post-ioma sinmortigo de la homaro. Genezo 2.15: „Kaj Dio la Eternulo prenis la homon kaj enloĝigis lin en la ĝardeno Edena, por ke li prilaboradu ĝin kaj gardu ĝin.“ Ĉu estas espero pri prudento?

Post afabla, senperturbe funkcia akcepto en la stacidomo la dua impresio frape seniluziigas. Kie estas Heilbronn la mezepoka, fama el la literaturo de la romantiko? Ĉu tiu inerte fluanta kanalo estas la rivero kun la gaja plaŭdanta nomo Neckar? Trafiko konfuziga en plenŝtopitaj stratoj, sobre postmilitaj fasadoj, kolbasobudoj, kaj jen tiu nereprezenta barako inter ruĝoretoj ja ŝoke memorigas la teruran 4-an de Decembro 1944. En nur malmultaj minutoj inter la 19.17 h kaj la 19.50 h 255 aeroplanegoj bombade ekstermis tiun pitoreskan urbon. 6530 homoj, ĉefe virinoj, infanoj kaj maljunuloj dum tiuj momentoj perdis sian vivon aŭ mortis pro la sekva incendio.

Kvieta vigleco, decbrila lumo, surstrata vivo, babila bruo iomon da iama etoso konsolite revekas promenado tra la fruaŭtunaj vesperoj en la trankviligitaj urbozonoj ĉirkaŭ rekonstruitaj urbdomo, St. Kilian kaj kavalira kortego.

Ŝvabaj kaj aliaj salutoj

Kiu sukcesas majstri la sespaŝan vitejoŝtuparon meritas diplomon. Egale ĉu bonveniga gesto aŭ ĉu negoca artifiko, almenaŭ bona okazo por gustumi ses apartajn vinojn ĉi-lokajn. Ankaŭ la sinjoro urbestro bonakonsciencie povis proponi tiun bongustan vinbertrinkafon kun tipa ŝvaba bakaĵo: salkringoj kun freŝa butero. En la restaŭrita antikva salonego de la urba konsilantaro

Lia Moŝto fieris saluti du prezidantojn, tridekon da funkciuloj kaj honorajn gastojn el sep eŭropaj landoj.

La kutima salutvespero sabata tamen havis denove tute alian karakteron. Unue la tondra blovorkestro ne povis multe ĝeni la babilemon de la kunvenintoj, ĝis, ĉarma ideo por saluti la gegastojn, trombone eksonis sveda, nederlanda, franca kaj fine, por ĉiuj ceteraj, ŝvabfervoja folklor-muziko. Ŝajnas, ke ankaŭ la „ŝvaban saluton“, cititan el la fruverko de Goethe „Götz von Berlichingen“ multaj kongresanoj aŭdis unuan fojon originale de aktora kavaliro kun la fera mano.

Korsango por ideo

Post enkonduko de LKK-estro Krüger, GEFA-prezidanto Gießner malfermis la jarkunvenon. Pli-malpli rutine ofte la oficialaj reprezentantoj plenumas sian taskon, saluti ie ial iajn kunvenintojn. Alie en Heilbronn! Fervoja direktoro Hertlein, reprezentanta la BSW-distriktestraron, alte taksas la celojn de la fervojaj esperantistoj. Li ekkonas, ke tiu ĉi movado eble ne estas taŭge lokigita inter BSW-grupoj pri ŝatokupoj, sed li komprenas, ke „tio jam ne estas hobbio, sed vi donas vian korsangon por la ideo de internacia amikeco.“ Tiel precize kaj klare neniam iu gasto de GEFA-Jarkunveno formulis la esencon de niaj klopodoj.

Fakprezidanto Heidenreich, kiu salutis ankaŭ por la direkcia prezidanto Dr. Keckeisen, nomis nian laboron senprestiĝa, sed internacia laŭ plej bela senco de tiu ĉi vorto. Li speciale agnoskas niajn fakterminajn progresojn.

Por la sindikato GdED distrikto Stuttgart OV Heilbronn salutis sinjoro Volk, profunde impresita pri la disvastigo de la Lingvo Internacia kaj la perfekte funkcia aplikacio. Sinjoro Zalder, reprezentanto de sindikato GDBA trovis komparon inter du grandaj poloj, Zamenhof kaj Wojtyła, ambaŭ batalantoj por la paco tutmonda. Tasko ankaŭ de sindikato estas, engaĝi sin por paco kaj homa bonfarto.

Prezidanto de GEA, Elisabeth Bormann, klarigis la situacion de Germana Esperanto-Asocio kaj ĝia eŭropa agado. Nunjare GEA kongresis du fojojn, ĉi tie kaj jam la printempon komune kun la Nederlanda Kongreso en Apeldoorn.

Por IFEF salutis ties vicprezidanto Wim van Leeuwen, invitanta al la venontjara kongreso de IFEF en America, Nederlando. La prezidanto de BEFA, De Sutter, Belgio, menciis la kulturajn taskojn, kiujn GEFA plenumas. Kolego Robiole kunportis la salutojn de la franca asocio FFEA. Por FERN parolis nia malnova nederlanda kolego de Jong, aprezante nian Bultenon kaj ĝian enhavon. Kolego Bengtsson transdiris salutojn de la svedaj fervojistoj kaj alludis la komunan fakan laboron en la komisionoj. Nome de la svisaj fervojistoj Otto Walder bondeziris al nia jarkunveno, tiu ĉi agrabla kombino de laboro kun plezuro. Kiel reprezentanto de eksterlandaj laboristoj en Germanio Panoussis Evangelos, membro de GEFA kaj ekzamenkandidato, memorigis kun gestika vervo pri tiuj ĉi kunlaborantoj, invitante samtempe al sia greka hejmlando, al kiu baldaŭ li reiros.

GEA kun GEFA

Multflankaj estas la rilatoj kaj kunlaboroj inter Germana Esperanto-Asocio kaj ĝia fervojfaka sekcio. Ne mirige, ke ĉi-foje GEFA gastigas sian estimindan patrinon GEA.

La dimanĉan ĉefkunvenon de GEA partoprenis ĉ. 40 personoj, kiuj reprezentis 332 membrojn. Raportoj el ligoj, sekcioj, komisionoj, instituto aliloke estas legeblaj. Timiga estas la longa listo de mortintoj; ankaŭ kiu funebras pri kara forpasinto ne povas pretervidi la minacan evoluon al troaĝiĝo de ĉiuj niaj organizaĵoj. Eĉ Germana Esperanto-Junularo ja kulturamas jam sian propran veteranan klubon.

Pentekoston 1980 oni kongresos en Berlin, 1981 en Westerland, 1982 en Münster. Nova-malnova GEA-prezidanto estas elektita Elsbeth Bormann.

Samtempe en alia salono 6 kandidatoj antaŭ la GEFA-ekzamenkomisiono de Germana Esperanto-Instituto sukcese trapasas la ekzamenon pri lingva kapableco.

Vojo kaj volo

Paralele en la supra salono GEFA solenas sian kulturan, folkloran, pripensigan aŭ instruon matineon. Kolego Barnickel ĝojigis per sia sonfilmo pri la kongreso en Turku. Nederlandaj kolegoj montris

logajn bildojn pri America, kiu gastigos la IFEF-kongreson.

Zorgoplenaj estas la vortoj de prezidanto Giebner pri la membroevoluo en GEFA. Malgraŭ sukcesa varbkampanjo en 1979 la reala nombro malpliĝis. La movado staras aŭ falas kun siaj aktivuloj, kiuj ĉiam malmultas. Kie estas volo, tie estas vojo, li citas malnovan saĝaĵon. Kien iras nia vojo? Ĉu ni sufiĉe malfermis nin al la publiko en kaj ekster la asocio?

Premiado de la ekzamenitoj, muziko, kantado, folkloro prezento finas la matenan solenaĵon kaj la 23-an Jarkunvenon de GEFA.

Kiel oni fariĝas Katinjo

Katinjo, nek nova faktermino nek neologismo poetika, sed „Käthchen von Heilbronn“ estas pli literatura ol historia figuro, tiel populara en Heilbronn, kiel alia junulino en Verona. La rekonstruitan korbeldon de Käthchen oni eksponas al turistoj, kiel la restaŭritan balkoneton de Julia. La nuntempa Katinjo de Heilbronn estas dujare nove elektita bela kaj inteligenta knabino, kiu je tiaj okazoj digne reprezentas sian hejmurbon. Kaj se la ĉi-jara trovos kursokazon, ni certe resalutos ŝin baldaŭ en Esperantujo.

Kelkiu folklorajo estis miksitaj inter la diversajn programerojn, historiaj figuroj kondukis en la pasintecon.

Fideleco laŭ Weinsberg

El la ekstermota kastelo de Weinsberg reĝo Konrad III. en 1140 permesis liberan foriron al la virinoj; ĉiu sian plej ŝatatan valoraĵon rajtis forporti kun si. La fidelaj virinoj, kiujn preskaŭ originale ni povis aplaudi dum la festvespero, saĝe portis surŝulte siajn edzojn el la sieĝita fortikaĵo.

Solidareco de emancipitaj virinoj! Unu ekskurso kondukis la kongresanojn al la monto de tiu ĉi evento, kies historia loko hodiaŭ estas dediĉita propraĵo de la virinoj.

Alia ekskurso vivigis la Staufur-historion de la 12.–13. jarcento en Wimpfen, la tiam plej granda imperiestra palaco norde de la alpoj. La densa programo ne permesis al ĉiu, konscie vidi ankaŭ la lokon de la jarkunveno mem, kiu sporade povis

konservi restaĵojn el interesaj, sed ne travivindaj periodoj de la fora historio.

nenio neniĝas

Per tiu maksimumo pri la ekvivalento de energio, Robert von Mayer, kuracisto kaj filozofo, plej fama filo de la urbo Heilbronn starigis la aserton, ke nenio perdiĝas en la neniejo. Sed same el nenio fariĝas nenion.

Proverboj ĉiam havas grajnon da vero, diras la popolo, kiel plaĉas aŭ male. Sentenco estas ofte nura vortludo. Sed

maksimo tiel reale bazita kaj rigore aplikita vidigas ne nur solvon pozitivan. Laŭ la ekvilibro inter kaŭzo-kialo kaj efiko-efekto ni certe devas esplori ne sole, kion krome ni povas aktivigi, sed samgrave eltrovi ankaŭ tion, kion eble ni faras malĝuste.

La kunsido de GEFA-komisiitoj ĉiam lasas malmultan tempon por tiaj diskutoj. Eble venontan jaron kun pli granda forumo en Oberkirch? Kie estas volo, tie estas vojo; sed nenio restas sen efika.

wbr

Jarraporto

pri la periodo de la 22a ĝis la 23a jarkunveno (1978/79)

Dum la raportperiodo denove la morto forprenis el niaj vicaj jenajn membrojn:

Alfrid Lemme, Ludwigshafen	19. 9.78
Fritz Behnke, Essen	6.10.78
Marianne Wichmann, Bremen	28.12.78
Axel Roos, Herzberg (Harz)	25. 6.79

Ili ripozu en paco.

Ĝenerala situacio

Plej oportune mi komence reiru al mia lastjara matinea alparolo. Tiam mi substrekis la neceson, ke ne nur unuopuloj brilu per elano, sed ke la tuta membraro devas montri pli da intereso, kiam temas pri la sorto de nia asocio. Tiam mi skizis al vi — kaj ne nur al vi, sed pere de nia Bulteno ankaŭ al la ne ĉeestantaj GEFA-anoj la akutan danĝeron, en kiu troviĝas la asocio, se ne konsiderinde kaj tre baldaŭ ŝanĝiĝos tiu ĝenerala indiferenteco en niaj vicoj. Tiam mi finis per la vortoj, ke la venonta jarkunveno, do la hodiaŭa, montros la rezulton, montros, ĉu la membraro estis preta, ekkoni la danĝeron kaj ekagi.

Kiam vi en la venonta Bulteno legos la jarraporton, kaj kiam vi nun aŭdos, kion ni povas bilanci pri tiuj pasintaj 12 monatoj, vi eble skuos la kapon, jes, kaj vi demandos vin mem, ĉu tio povas esti vera. Sed estas. Vi memoras, ke en Bremen mi anoncis varbkampanjon, kiu fakte okazis en la vintraj monatoj. La rezulton ni publikigis en Bulteno, la kampanjo liveris al GEFA 48 novajn

membrojn. Almenaŭ io. Sed kiam vi aŭdas, ke nur 15 personoj, tio estas 3% de nia membraro, bonvolis kunhelpi en tiu eta sukceso (inter ili 9 personoj, kiuj jam ĉiam kaj daŭre kunlaboras), tiam oni fakte devas skui la kapon. Imagu, se almenaŭ 50 aŭ 60 procentoj de la membraro estus helpintaj, kiom da novaj membroj ni havus!

Kaj oni denove skuas la kapon aŭdante, ke certa nombro de la membraro nenion scias pri la asociaj problemoj, ĉar ili simple ne legas la organojn Bulteno kaj Internacia Fervojisto. Jen mi petas ĉiun membron, kiu sentas en si eĉ nur iomete da respondeco por la sorto de GEFA, ke li aŭ ŝi ne nur agu konsekvence por sia persono, sed ankaŭ influu aliajn membrojn en sia grupo kaj ĉirkaŭaĵo. Jen ne nur tasko por funkciuloj, sed por ĉiu, vere ĉiu unuopulo. Nek ludas rolon la aĝo nek izoleco nek la ofte citata „multokupiteco“. Ĉar kiu ne estus multokupata? Sed ĉu vere ne eblas trovi inter siaj multaj konatoj kaj amikoj unu, du personojn, kiujn oni povas interesi por la problemoj de la internacia interkompreniĝo, kiujn oni povas peti montri sian simpatian por tiuj problemoj kaj fariĝi membro ĉe ni, ankaŭ se ne ĉiuj tiuj personoj pretas estiĝi aktivaj esperantistoj. Certa procentaĵo el ili tamen fariĝos pli ol nura simpatianto. Kaj nia afero ja ankaŭ bezonas simpatiantojn, ju pli multajn, des pli bone.

Ni ankaŭ ne pretervidu alian punkton tre gravan. Ofte ni jam aŭdis belajn vortojn en niaj jarkunvenoj el la buŝo de reprezentantoj de fervojo, sindikatoj, BSW. Oni agnoskas la neceson de interliga lingvo, oni laŭdas nian celtrafan laboron, oni deziras al ni sukceson, oni ankaŭ atestas al ni, ke ne ĉefas la membro-nombro, sed multe pli gravas la alta grado de idealismo kaj aktiveco. Sed kio estas la vero? La vero estas, ke oni komparas nin kun la aliaj kulturaj liber-tempaj grupoj, prefere kun laŭnombro pli fortaj, kaj mezuras nin laŭ nia membro-nombro. Tre atente oni tie registris la konstantan regreson de la pasintaj jaroj. Pro tio ni ne subtaksu tiun negativan sintenadon de por ni gravaj instancoj, kiun ni plej rapide kaj pozitive povos influi per kreskigo de nia membronombro. Kroma dezirinda rezulto estus, ke per alfluo de novaj membroj kun certeco ni ankaŭ povus pozitive influi la tre malfavoran aĝostrukturon de GEFA. Ankaŭ tio nepre necesas, ĉar la procentaĵo de maljunuloj inter ni estas multe tro alta.

Mi opinias, ke mi denove kaj sufiĉe klare prezentis al vi la vundajn punktojn de nia organiza vivo, kiun oni kelkloke eĉ ne povas nomi „vivo“. Denove mi petas vian intereson kaj kunhelpon, vian bonvolon kaj aktiviĝon. Neniu alia vojo ekzistas ol tiu, por vivteni nian asocion. Mi finas per la samaj vortoj kiel pasintjare: Vi ĉiuj kaj la tuta membraro havas en la manoj la sorton de GEFA.

1. Organizaj aferoj

1.1 Membrostato

Por 1979 GEFA pagis al IFEF 824 kotizojn por individuaj kaj korporaciaj membroj, kio donas, kiel kutime en la pasintaj jaroj, la rajton por 5 komitatoj. La jaron 1979 ni komencis kun 496 individuaj membroj, kio signifas regreson de 8 membroj kontraŭ la antaŭa jaro. El ili 41% estas emerituloj (185) resp. familianoj (21). Tio estas komplete nekontentiga. La afero ne aspektas malpli malbone, kiam oni scias, ke multaj organizoj suferas pro simila stato. Aldoniĝas la danĝera manko de junuloj. Ni nur havas 24 membrojn pli junajn ol 30 jaroj, apenaŭ 5%, kiuj bedaŭrinde ne aktive kunlaboras.

La varbkampanjo de la pasinta vintro havigis al GEFA 48 novajn membrojn. Tio estas io, sed ne multe. Kaj estis pli ol seniluziige, kiam ni devis konstati, ke nur 15 personoj, t.e. 3% (!) de la membraro, partoprenis en la varbado kaj ke el tiuj 15 estis 9 daŭraj kunlaborantoj. Tio signifas, ke nur 6 (!) membroj, kiuj ne jam kutime partoprenas en la asocia laboro, kunagis en la varbado. Dankon al tiuj malmultaj bonvolemluloj. Sed la aliajn 97% oni devas demandi, kiamaniere ili imagas la estontan ekzistadon de nia asocio, kiam ili absolute ne pretas fari ion por ĝi. Pro tio denove ni petas ĉiujn niajn membrojn, daŭre klopodi trovi interesulojn por nia afero ankaŭ sen ke ni organizas varbkampanjon. Kie estas volo, tie estas vojo!

1.2 Kotizo

Ĝi restis la sama, do 9 GM por la tuta jaro. Intertempe la IFEF-komitato decidis plialtigon de la IFEF-kotizo de 12 al 17 danaj kronoj ek de 1980. Tio antaŭvideble ankaŭ devigos nin, iomete plialtigi nian jarkotizon laŭ decido en la jarkunveno de Heilbronn.

1.3 Kunlaborantoj

Ŝanĝiĝis la distrikt-komisiitoj en Nürnberg kaj Hamburg. En Nürnberg kolego BHS Hans Müller pro sia sanstato deziris liberiĝi de la longjara laboro. Posteulo fariĝis TBAR Vitus Röder.

En Hamburg BAR a. D. Werner Lepke, kiu jam de kelkaj jaroj post sia emeritiĝo daŭrigis la ŝatatan laboron, nun cedis la oficon al la pli juna kolego BHS Klaus Böhnke. Ni kore dankas al ambaŭ ĝisnunaj komisiitoj pro ilia afabla, sincera kunlaborado, dum al la du novaj ni deziras sukceson kaj ĉiam ĝojon en ilia ofico. Bedaŭrinde mankas komisiito por informado kaj varbado, de kiam kol. Brandenburg devis fordoni tiun oficon pro defora troŝarĝo. Posteulo urĝe estas bezonata.

La laborkonsilantaro kunvenis dufoje kun la distriktaj kaj specialaj komisiitoj, nome en la jarkunveno de Bremen kaj en Aprilo en Frankfurt.

1.4 Kursoj

En la jaro 1978 komenciĝis 8 kursoj. Tio estas eta pliboniĝo kompare al la antaŭa

jaro, tamen tro malmulte. La kursoj estas unu el la eblecoj, certigi la ekziston de la asocio. Sed kie ĉiam restas la partoprenintaj kursanoj? Jen grava tasko por ĉiuj gvidantoj de kursoj kaj grupoj kaj por la distriktkomisiitoj: post kursfino zorgu por la novuloj! Gravega problemo nepre solvenda.

2. Kunlaboro en IFEF

Kiel ĉiam partoprenis konsiderinda germana grupo en la IFEF-kongreso, ĉi-foje en la sudfinna urbo Turku. GEFA estis reprezentita de la komitatanoj Graß, Schrapp, Ritterspach, krome kiel anstataŭantoj Lepke kaj Böhnke. La du valoraj fakprelegoj aperis iom mallongigitaj en Esperanto kaj germana lingvo en Bulteno 3/79. Estas tre rekomendinde transdoni ilin al multaj interesuloj kaj instancoj.

La tre rezultplena kunlaboro en la Terminara Komisiono daŭras. Ankaŭ la „Terminara Kuriero“ bone vivas kaj seninterrompe provizas la komisionanojn per informoj kaj sugestoj sub la lerta redaktado de Hartig, kiu krome okazigis bonege organizitan kunsidon de la komisiono en Bremen. Ritterspach kiel sekretario kaj Hartig kiel redaktoro de la Terminara Komisiono estas reelikitaj por 2 jaroj en Turku.

La ĝisnuna gvidanto de la Fakprelega Komisiono, Brandenburg, demisiis post 12jara gvidado, sed restos membro de la komisiono. Kiel sekretario ankaŭ elektiĝis Ritterspach. Brandenburg, kiu devis demisiis pro sia deĵora troŝarĝo, meritas sinceran dankon pro tiu daŭra senriproĉa laboro sur internacia nivelo, per kiu li en elstara maniero servis al IFEF kaj modele reprezentis la germanan asocion.

Laŭ peto de la BSW-ĉefestraro GEFA transprenis la taskon organizi la IFEF-kongreson en 1981 kaj invitis al ĝi en Turku. Ĝi okazos en Majo en Regensburg. LKK jam formiĝis kaj la unuaj necesaj laboroj jam estas faritaj resp. farataj.

3. Kontaktoj, aranĝoj

De la 6a ĝis la 8a de Oktobro 1978 okazis la 22a jarkunveno de GEFA en Bremen. La 216 gemanaj kaj eksterlandaj gastoj el 8 landoj travivis eksterordinare bone organizitan kunvenon, kiu estis la

plej forte vizitita ĝis nun. 6 kandidatoj estis sukcese ekzamenitaj de la GEFA-komisiono. Ĉeestis s-ro Bayerath kiel reprezentanto de la BSW-ĉefestraro. Li honoris per librodonaco la prezidanton de GEFA, Gießner, pro 30jara honorofica agado por la sociala kaj kultura sektoro en BSW, inter kiu tempo pli ol 25 jarojn por la Internacia Lingvo.

Kompreneble multaj GEFA-anoj kiel kutime partoprenis en jarkunvenoj de aliaj landaj asocioj de IFEF, en la Internacia IFEF-skisemajno en Maria Alm (Aŭstrio), en la UK Luzern (Svisio) kaj aliaj. S-ino Kruse faris plurajn prelegvojaĝojn al diversaj landoj kaj en Germanio pri siaj travivaĵoj en Bona Espero (Brazilo). La kontaktoj kun BSW, GEA, GEI, IEMW kaj la sindikatoj bone funkciis.

4. Informado

„Bulteno“ aperis kvinfoje (n-roj 5/78 – 4/79) kun entute 52 paĝoj kaj 15 bildoj. Certe oni povas aserti, ke la enhavo de la Bulteno estas multfaceta kaj interesa. Ĝi ankaŭ enhavas germanlingvajn artikolojn. Kaj ankaŭ la ekstera aspekto laŭ kvalito de la presado kaj bildoj estas senriproĉa, ne laste merito de la presisto, kiu jam kontentige regas nian lingvon, estas nia membro kaj jam vizitis kelkajn jarkunvenojn.

En „Amtsblatt“ ni povis registri 14 komunikaĵojn, en la ĉiutaga gazetaro minimume 102 artikolojn kaj notojn pri nia agado. La migra ekspozicio, kiun ĉefe kreis nia mortinta kolego Jentsch, ne plu estas uzebila. Ĉar intertempe ekzistas en Germanio diversaj similaj ekspozicioj, ni rezignis investi la monon kaj laboron necesajn por konstrui novan modernan ekspozicion kaj laŭbezone utiligos alian ekzistantan materialon.

Ni konstatis radio-sendaĵojn en Radio Bremen, Bayrischer Rundfunk kaj Radio Warszawa, krome 2 televidajn sendaĵojn en München. Estis eldonitaj ĉ. 1000 varbiloj A4, pli ol 2000 flugfolioj kaj 1000 broŝuroj. Ankaŭ afiŝoj estis aplikitaj.

Menciindas, ke en Essen, Hamburg, Frankfurt kaj München niaj respondeculoj provis diversmaniere, kontaktiĝi kun junaj fervojistoj, tamen ĝis nun sen videbla rezulto.

Entute la laboro en diversaj grupoj estas vere vigla, sed ne eblas ĉion mencii en jarraporto. Bv. kompari la Bultenojn.

La klopodoj de kolego Barnickel havis sukceson: Post longa paŭzo la Germana Federacia Fervojo denove reklamis en la jarlibro de UEA 1979 per tutpaĝa anonco.

5. Emerituloj

En Septembro 1979 sekvis la emerituloj la inviton al Kassel, kie denove regis la kutima agrabla atmosfero. La organizado de tiuj renkontiĝoj estas nun la labor-kampo (i. a.) de s-ino Kruse, kiu intertempe mem eniris en la rondon de la emerituloj.

kompilis Gießner

Jahresbericht (Auszug in deutscher Sprache)

über den Zeitraum von der 22. bis zur 23. Jahresversammlung

1. Organisatorisches

1.1 Mitgliederstand

Für 1979 hat GEFA 824 Beiträge für Einzel- und korporative Mitglieder an IFEF abgeführt und stellt daher wie bisher 5 Delegierte. Das Jahr 1979 haben wir mit 496 Einzelmitgliedern (-8) begonnen. Der Prozentsatz der Ruheständler und Familienangehörigen ist zu hoch, der Mangel an Nachwuchs bedrohlich. Zwar hat die Werbeaktion im Winter 48 neue Mitglieder gebracht, jedoch war die allgemeine Beteiligung an dieser Werbung enttäuschend gering. Nur 15 Personen haben dem Aufruf Folge geleistet. Die übrigen müssen sich fragen lassen, wie sie sich den Bestand der Vereinigung in Zukunft vorstellen. Wir bitten daher **alle Mitglieder**, auch ohne besondere Aufforderung laufend der Vereinigung neue Interessenten zuzuführen.

1.2 Beitrag

Der Beitrag blieb unverändert, wird jedoch voraussichtlich wegen Anhebung des IFEF-Beitrages ab 1980 etwas erhöht.

1.3 Mitarbeiter

Die Bezirksbeauftragten von Nürnberg, BHS Müller, und Hamburg, BAR a. D. Lepke, legten nach langjähriger Tätigkeit ihre Ämter nieder. Nachfolger wurden in Nürnberg ab 1. 5. 1979 TBAR Röder, in Hamburg ab 1. 10. 1979 BHS Böhnke.

Für das Amt des Sonderbeauftragten für Information und Werbung wird dringend ein Mitarbeiter gesucht.

Der Arbeitsausschuß kam mit den Bezirks- und Sonderbeauftragten in der Jahresversammlung Bremen und im April in Frankfurt zusammen.

1.4 Kurse

1978/79 wurden 8 Sprachkurse durchgeführt.

2. Mitarbeit in IFEF

Am 31. IFEF-Kongreß in Turku nahm wieder eine starke deutsche Gruppe teil. GEFA wurde durch die Kollegen Graß, Schrupp, Ritterspach, Lepke und Böhnke im Kongreß vertreten. Die zwei sehr interessanten Fachvorträge sind in Kurzfassung zweisprachig im Bulteno 3/79 erschienen.

Im ständigen Ausschuß für das Fachwörterwesen wurden die Kollegen Ritterspach als Sekretär und Hartig als Redakteur des sehr geschätzten interessanten Mitteilungsblattes „Terminara Kuriero“ für 2 Jahre wiedergewählt, dgl. Ritterspach als Sekretär des Ständigen Ausschusses für Fachvorträge.

Eine Sitzung des erstgenannten Ausschusses wurde in Bremen durchgeführt.

Auf Ersuchen des BSW-Hauptvorstandes wird der 33. IFEF-Kongreß in Deutschland abgehalten und zwar im Mai 1981 in Regensburg. Der Kongreßausschuß ist gebildet, die notwendigen Vorarbeiten sind angelaufen.

3. Kontakte, Veranstaltungen

Vom 6. bis 8. 10. 1978 fand die 22. Jahresversammlung in Bremen statt. Sie war mit 216 deutschen und ausländischen Gästen aus 8 Ländern die bisher am stärksten besuchte. 6 Kandidaten bestanden vor dem GEFA-Prüfungsausschuß die Sprach- bzw. Kursabschlußprüfung. Kollege Bayerath vertrat den BSW-Hauptvorstand und überreichte dem Beauftragten für Esperanto und GEFA-Vorsitzenden Gießner ein Buchgeschenk

für 30jährige ehrenvolle Tätigkeit im BSW, darunter mehr als 25 Jahre für die Internationale Sprache.

Auch im Berichtszeitraum nahmen wieder zahlreiche GEFA-Angehörige an in- und ausländischen Esperanto-Veranstaltungen teil, so z. B. an der Internationalen IFEF-Skiwoche in Maria Alm (Österreich), am Allgemeinen Weltkongreß in Luzern und an Jahresversammlungen anderer IFEF-Landesverbände.

Die Zusammenarbeit mit dem BSW, dem Deutschen Esperanto-Bund, dem Deutschen Esperanto-Institut sowie mit den Gewerkschaften war gut.

4. Information

Das „Bulteno“ erschien 5mal mit 52 Seiten und 15 Abbildungen. Sein Inhalt ist viel-

Adapto de la GEFA-kotizo

En la jarkunveno de Heilbronn ni devis adapti la GEFA-kotizon al la plialtigita IFEF-kotizo. Tio signifas monatan plialtigon de 25 Pfenigoj resp. jaran sumon de 12 GM. Ni petas niajn membrojn post kelkara stabileco de la kotizo havi komprenon por tiu eta plialtigo.

GEFA-estraro

Veränderung des Anschriftenverzeichnisses, Bulteno 1/1979, Seite 8, gültig ab 1.1.1980

Bba Hamburg: BHS Böhne, Bf 2400 Lübeck Hbf; Basa 947/866/377 oder 424

Bba Karlsruhe: BOS Bernhard, Bf 6737 Böhl-Iggelheim; Basa 953/852/70/55

Bba Saarbrücken: BHS Hauptenthal, BD 6600 Saarbrücken, V 26; Basa 956/5475

Bba Stuttgart: TBOAR Krüger, BD 7000 Stuttgart, Bmkr 3; Basa 952/3125

Vicprezidanto/Redaktoro: BAR a. D. Graß, Betreuungsstelle Bf 5650 Solingen-Ohligs, privat: 5650 Solingen 11, Meteorstraße 13, Telef. 0 21 22 / 33 33 35

Al niaj membroj kaj eksterlandaj geamikoj ni deziras ĝojigan Kristfeston kaj sukcesplenan Novan Jaron.

seitig und interessant. Es enthält auch deutschsprachige Artikel. Druck und Bildwiedergabe sind tadellos.

In den Amtsblättern haben wir 14 Mitteilungen, in der Tagespresse mindestens 102 Artikel und Notizen über unsere Arbeit festgestellt. Die Wanderausstellung war stark abgenutzt und überaltert. Sie wurde deshalb außer Dienst gestellt. Künftig benutzen wir anderenorts vorhandenes Ausstellungsmaterial. Radiosendungen wurden über uns von Radio Bremen, vom Bayrischen Rundfunk und von Radio Warschau verbreitet, dgl. 2 Fernsehsendungen in München. Mehrere tausend Flugblätter und anderes Informationsmaterial wurden verteilt.

5. Altenbetreuung

Das diesjährige Treffen der Ruheständler am 22. 9. 1979 fand in Kassel statt.

Nova Esperanto-prospekto

La Turisma Oficejo en Nancy eldonis novan 10-paĝan ilustritan prospekton en Esperanto. Ĉiu interesato povas ricevi ĝin senpage. Nancy situas en nordorienta Francio; ĝi estas eŭropa vojetapo inter Benelukso aŭ Germanio kaj Mediteraneo unuflanke aŭ inter Benelukso kaj Svislando aŭ Parizo aliaflanke. Nancy posedas interesajn muzeojn kaj monumentaron de la 18a jarcento kaj ĝi estas elirpunkto por belegaj ekskursoj. Antaŭ ol viziti Nancy, avertu la lokajn Esperanto-delegitojn. Por ricevi la prospekton oni turnu sin al: Turisma Oficejo — 14, Place Stanislas F - 54000 Nancy.

Hannover/Bremen

Ĉe l' malriĉa diablo“
La gastejo de niaj geamikoj Genevois malfermis sian pordon! Ni deziras tutkore bonan sukceson kaj agrablajn, multenombrajn gastejojn! Vizitu la malriĉan diablon en Bremen, Hohentors Heerstr. 176

Redaktfino por n-ro 1/80 estas la 15.1.1980

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 5650 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz.